Theodor Fontane,

# Vin vokas mi

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Mizera kano estas mi
Kun pensoj kaj kun sentoj
Ŝanceliĝantaj tien ĉi
Kaj tien en la ventoj.

Vin vokas mi; ĉar estas de
Vi mem gardata ĉio,
Fortigu mian koron, ke
Mi ne perdiĝu, Dio.

Mi petas Vin, Sinjoro, pri
La fort' al mi mankanta,
Alie estingiĝu ĉi
Vaglum' sur marĉ' flagranta.

*Traduko de la Germana poemo "Dich ruf ich" de* THEODOR FONTANE *(Teodoro Fontano, ∗1819-12-30 – †1898-09-20) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1986-12-19.*

*MR-198-2 / Arg-289-586 (2005-02-09 11:08:13)*